

La komenco de la Butonmilito, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 555/87-2, 1982 februaro 04 kaj 06.
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-87/SRI-1982-87-2-555-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-komenco-de-la-Butonmilito-2.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por marki la jubileon Louis Pergaud Kultura Centro Esperantista eldonos ĉijare la romanon de tiu franclingva verkisto dank' al lerta esperantigo de Roger Bernard. Jen hodiaŭ ni laŭtlegas al vi, kiel komenciĝis tiu butonmilito:

A.- Surmetu viajn bluzojn, kunprenu panpecon, kaj ni rapide kuniĝu malsupre de Saute en la ŝtonminejo de Pepiot.

Cl.- Ili disaperis kvazaŭ paserbando, kaj kvin minutojn poste, unu post la alia, panon inter la dentoj, ili rekuniĝis sur la lokon indikitan de la generalo.

A.- Ni ne iru trans la vojkurbo, rekomendis Lebrac, konscia pri sia rolo kaj zorganta pri sia trupo.

Cl.- Vi kredas, ke ili venos?

A.- Se ne, ili estus belaj fekuloj, - kaj li aldonis por klarigi sian ordonon: Estas da ili sufiĉe lertaj, vi sciu, el tiuj plumpuloj; vi aŭdas? he Boulot, atentu ne kaptiĝi! Prenu ŝtonpecojn en la poŝojn; al la tiuj kun la elastoj donu la plej belajn ŝtonerojn, kaj atentu ne perdi ilin. Ni iros ĝis Gros Buisson.

Cl.- Ampleksa masivo el kverkoj, dornoj, prunelujoj, juglandarboj, plenigas tiun duoncirklon, kiun oni nomas la Gros Buisson. Subĉielaj ŝtonejoj ekspluatataj de Pepiot la lamulo, Laugu el la Muelejo, kiuj drinkinte nomas sin entreprenistoj, kaj ankaŭ de Abel la Rato, sube borderas la vojon. Por la buboj ĉi minejoj estas nur bonegaj kaj neelĉerpeblaj provizejoj. Kaj jen do sur tiu fatala tereno, egaldistanca de ambaŭ vilaĝoj, jam de jaroj kaj jaroj, tutaj generacioj el Longeverne kaj Velrans malavare interdraŝiĝis, ĉar ĉio rekomenciĝis je ĉiu aŭtuno kaj ĉiu vintro.

A.- Ankoraŭ ne pasis kvin minutoj, de kiam ĉiu finmanĝis sian panon, kaj jam Camus la grimpujo, gvate postenita en la branĉoj de l' granda kverko, signalis suspektindajn moviĝojn ĉe la malamika limo.

Cl.- Ĉu mi ne antaŭvidis! konstatis Lebrac. Kaŭriĝu, ke ili kredu ke mi stas sola. Mi ekscitos ilin, kss-kss, hej o! kaj se hazarde ili impetus por kapti min... hop!

A.- Kaj kiam Lebrac eliris dornoplena, la jena diplomatia konversacio komenciĝis laŭ la kutima maniero:

Cl.- He do montru vin, he granda kreteno, pugvizaĝo, pigrulo, putra! Se vi havas kuraĝon, montru ĝin : vian aĉan faŭkon de merdviŝulo!

A.- Ho mensokripla, proksimiĝu vi, provis rebati la malamiko.

Cl.- Tiu estas la Aztek des Gués, diris Camus, sed mi vidas ankaŭ Touegueule, kaj Bancal, kaj Tatti kaj Migue-la-Lune: ili abundas kiel laksaĵo.

A.- Aŭdinte tiun informon la granda Lebrac daŭrigis:

Cl.- He ĉu ne vi, merdulo, kiu baptis la Longevernajn molkojonaj! Ha mi montris al vi, se ni estas molkojonaj! Vi bezonis ĉiujn viajn malpurajn ĉemiz-baskojn por forviŝi, kion mi stampis sur la pordon de via preĝejo! Specoj de kakuloj kiel vi ja ne kuraĝus fairi same!

A.- Proksimiĝu do kelke, vi tiel lerta, granda alfaŭkulo, nur buŝegon vi havas kaj kruretojn por fuŝfuĝi!

Cl.- Paŝu nur duone ĝis ĉi tie, he, ĉifono! Ne tial, ke via patro palpas la kojonojn de l'bovinoj sur la foirejoj vi fariĝis riĉaj!

A.- Kaj vi! via barako, kie vi putras, estas surŝutita de hipotekoj anstataŭ tegoloj!

Cl.- Vi mem hipotekaĉo, trenanto de almozsako! Kiam estos, ke vi reprenos la tolan pafilon de via avo por iri frakasi la pordojn per amaso da "Patro Nia"?

A.- Ĉe ni ne estas kiel en Longeverne, kie la kokinoj malsatmortas dum plena somerrikolto.

Cl.- Sed ĉe vi en Velrans krevas la pedikoj sur viaj kapaĉoj, sed oni ne scias ĉu pro malsato aŭ pro veneniĝo.

Velra, Putra,
La Murdia,
Trans kaj tra...

A.- Hu!... hu!... hu!... siblis malantaŭ sia ĉefo la ĥoro de Longeverne-soldatoj ne povantaj kaŝiĝi pli longe kaj pli longe elteni sian entuziasmon kaj sian koleron. La Aztek rebatis :
Longeverne,
Pika merde,
Palpa merde -
Vi rajde sur kvar stabloj
Vin tiras la diabloj!

Kaj la ĥoro de Velrans siavice freneze aplaŭdis la generalon per longaj kaj eŭfoniaj "hoj! hoj! hoj!".

Cl.- Lavango da insultoj kirle kaj tornade pafiĝis ambaŭflanke, kaj poste ambaŭ estroj, egale ekscititaj ankaŭ pafinte klasikajn kaj modernajn insultojn: Enbatantoj de malfermitaj pordoj! Strangolantoj de katoj per la vosto, ktp., revenante al la antikva modo kraĉis al vizaĝo de la alia, kun la kutima mallojaleco, la plej neimageblajn kaj hontindajn akuzojn el sia repertuaro.

A.- Heho! Ĉu vi memoras, kiam via patrino pisis en vian kaĉon por enmeti saŭcon!

Cl.- Kaj vi, kiam ŝi petis la tranĉaĵojn de la taŭrkastristo por ke vi manĝu ilin salate!

A.- Memoru vi la tagon, kiam via patro diris, ke al li pli sukcesus breedi bovinon ol aĉan merlon kiel vi!

Cl.- Kaj vi? kiam via patrino asertis, ke ŝi preferus mamsuĉigi bovinon ol vian fratinon, ĉar tiel ŝi almenaŭ ne putinon edukus!

A.- Mia fratino, respondis la alia kiu cetere fratino he havis, kirlas buteron, kiam ŝi merdon kirlas, tiam vi venos leki la bastonon; aŭ ŝi estas per ardezoj pavimita por ke la bufaĉoj kia vi ne surgrimpu ŝin!

Cl.- Atentu! avertis Camus, jen Touegueule kiu ĵetas ŝtonojn per sia "lasta" katapulto.

A.- Ŝtonpeco, fakte, siblis en la aero super la kapoj, al kio mokridoj respondis, kaj aroj da kuglaĵoj de ambaŭ flankoj trastriis la ĉielon, dum la ŝaŭma kaj senĉesa inundo de fiaj insultoj daŭre fluadis de Gros Buisson ĝis la limo, tial ke la repertuaro de ambaŭ partioj estis same abunda kaj riĉa.

Cl.- Sed estis hodiaŭ dimanĉo : ambaŭ rotoj surhavis siajn belajn vestojn, kaj neniuj el la ĉefoj aŭ soldatoj kuraĝis endanĝerigi ilin en riskaj luktoj.

A.- Tial do la batalo ĉi tiun tagon limis sin je tiu interŝanĝo de vidpunktoj, se tiel diri, kaj je tiu artileria duelo, kiu cetere neniun gravan vundon okazigis, en kiu ajn el ambaŭ partioj.

Cl.- Vi povos relegi tiun komencon de la butonmilito en tre bele ilustrita volumo, kiun Kultura Centro Esperantista ĉijare eldonas. En alia elsendo ni diros kelkajn vortojn pri la infaneco de la aŭtoro de tiu romano, Louis Pergaud. Ĝis reaŭdo!